

DIO SENDIS SIAN FILON EN LA MONDON, POR KE LA MONDO PER LI SAVIĜU – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 3,16-18

En tiu tempo Jesuo diris al Nikodemo:

“Dio tiel amis la mondon, ke Li fordonis sian unikan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je Li, ne pereu, sed havu eternan vivon.

Dio sendis sian Filon en la mondon, ne por kondamni la mondon, sed por ke la mondo per Li saviĝu.

Kiu kredas je Li, ne estos juĝata; sed la nekredanto jam estas juĝita, ĉar li ne kredas en la nomo de la ununaskita Filo de Dio”.

Dio ne estas juĝisto, sed estas tiu kiu komunikas vivon kaj proponas al la homaro la vivplenecon kiu manifestiĝis kaj prezentiĝis en la ununura filo, Jesuo. Tio estas la evangelio de Johano, ĉapitro 3, versikloj 16-18, sed kiujn ni devus kompletigi per la 19-a kaj 20-a, aliel la peco, tiel kiel ĝi estas amputita por la liturgio, ne estas komprenebla.

“Dio tiel amis la mondon”, do estas tiu manifestiĝo de amo fare de Dio al la mondo. Dio ne estas iu pesimisma Dio, iu Dio naŭzita pro la homaro, sed iu Dio enamiĝinta al la homaro. Kaj li estas tiom enamiĝinta, li tiom amis la mondon,” ke Li fordonis sian unikan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je Li...”

Kredi en la ununaskita filo signifas kredi en la modelo de la homaro. Ĉi tie Jesuo estas prezentata kiel la ununaskita filo. Li estas filo de Dio, pro la fakto ke Jesuo manifestas Dion en sia homa kondiĉo, sed li estas filo de la

Homo pro la fakto ke li reprezentas la homon en la dia kondiĉo. En Jesuo do estas la modelo de la homaro. Tiuj kiuj aliĝis al tiu modelo de homaro, kaj la modelo de la homaro, la kreskado, la plena maturiĝo de la homo, havas amkapablon kiu ne lasas sin kondiĉigi fare de neniuj.

"Ne pereu, sed havu eternan vivon". La eterna vivo por Jesuo ne estas promeso por la estonto, sed ebleco en la nuntempo. Kiu ajn vivas metante en sian vivon amon similan al tiu kiun Dio havas por ni, nome totalan, senkondiĉan kaj senliman amon, tiu jam havas vivon de tioma kvalito nomata eterna, ne tiom pro la daŭro, sed ĝuste pro la kvalito, kiu estas nedetruebla: la morto ne povos eĉ ĝin skrapeti.

"Dio fakte ne sendis sian Filon", kaj refoje oni insistas pri tiu 'filo', la filo de Dio, la filo de la Homo, en la homa pleneco kiu implicas la dian kondiĉon, *"en la mondon"*, kaj ĉi tie oni ne diras "por kondamni", la verbo estas juĝi. Dio ne estas juĝisto, sed tiu kiu komunikas vivon. Kaj la Filo same.

Li do ne sendis la filon por juĝi la mondon; tiu estis la atendo de la fariseoj kiuj atendadis iun mesion venintan por juĝi, por dividi la bonulojn disde la malbonuloj, la purulojn disde la malpuruloj, sed ne Dion, ne Jesuon. Li do ne sendis la filon por juĝi, sed por ke *"la mondo per Li saviĝu"*.

Jesuo proponas vivalternativon, proponas soci-alternativon. Tiuj kiuj ĝin akceptas estas kun li en la pleneco de la vivo. "Kiu kredas je Li" – kaj kredi signifas aliĝi al tiu hommodelo, al tiu homo kapabla je senlima kaj senkondiĉa amo - "ne estos juĝata". Oni iras do renkonte al neniuj juĝoj. La ideo de iu juĝo estas fremda al evangelio de Johano. Kiu kredas, tiu ne iras renkonte al ajna juĝo, sed li jam estas en la viv-pleneco.

Male, kiu ne kredas, tiu jam estas juĝita, "ĉar li ne kredas en la nomo de la ununaskita Filo de Dio". Estas la homo kiu mem juĝas sin, rifuzante tiun vivplenecon, tiun amon. La rifuzo de la vivpleneco, kiu estas Jesuo, implicas la plenecon de la morto. Tiu estas la signifo kiun volas doni la evangeliisto, tiu juĝo kiu sekve iĝas kondamno.

La mesaĝo de Dio do estas tute pozitiva: kiu ĝin akceptas estas en la vivplenecon, kiu ĝin rifuzas ne estas juĝata, sed tiu sin kondamnas per si mem. Kaj jen do la versikloj 19 kaj 20 kiuj pli bone komprenigas tiun penson kiu aliel estas tiel amputita.

Kaj la evangeliisto skribas: *"La lumo venis en la mondon kaj la homoj preferis la mallumon al la lumo ĉar iliaj agadoj estis fiaj"*. Jen la juĝo. Tiuj kiuj, eĉ vidante brili la lumon de la Sinjoro, retiriĝas, restas en la kadro de la morto. Tiuj kiuj, male, estas altirataj de tiu lumkonuso, eniras en la vivplenecon. Fakte, komentas la evangeliisto: *"Kiu ajn fakte agas malbone, tiu malamas la lumon kaj ne venas al la lumo por ke liaj agoj ne estu kritikataj"*.

Ne estas do ajna juĝo flanke de Dio, estas pozitiva vivpropono. Kiu lin akceptas tiu estas en la vivpleneco, kiu lin rifuzas, ĉar tiu vivpleneco estas kontraŭa al liaj intereso, al liaj aspiroj, tiu restas en la kadro de la morto. Ne pro iu juĝo pri Dio, sed pro iu juĝo kiun la homo, pro memelekto, donis al si mem.